
La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-12-19 n-ro 390

# Historia rezolucio



Erdoğan: Turkio starigos sian ambasadorejon en Orient-Jerusalemo

Rusio sukcese sendis kunhoman spacoŝipon al internacia kosmostacio

Konkura vendo de speciala kafo – la rekordo pri prezo

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin [Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Erdoğan: Turkio starigos sian ambasadorejon en Orient-Jerusalemo
*Gvidantoj de islamaj landoj agnoskis Orient-Jerusalemon kiel ĉefurbon de palestina ŝtato p. 03*

Rusio sukcese sendis kunhoman spacoŝipon al internacia kosmostacio
*Rusia, Usona kaj Japana astronaŭtoj p. 04*

Konkura vendo de speciala kafo – la rekordo pri prezo
*Ĉirkaŭ 14 300 eŭroj p. 04*

Filozofio: Memhelpaj filozofiaj skoloj en la antikveco
*Epikurismo p. 05*

Historia rezolucio
*Protektado de kultura heredaĵo p. 07*



## ERDOĞAN: Turkio starigos sian ambasadorejon en Orient-Jerusalemo

Laslatempe gvidantoj de islamaj landoj agnoskis Orient-Jerusalemon kiel ĉefurbon de palestina ŝtato. Turka prezidento Recep Tayyip ERDOĞAN [reˈdʒep tajˈjip ˈærdo(ɰ)an] diris sabate [16 dec 2017], ke Turkio starigos sian ambsadorejon al Palestino en Orient-Jerusalemo.

ERDOĞAN faris siajn rimarkojn en kunveno de la turka reganta Partio de Justeco kaj Disvolvado en la centra provinco *Karaman*. Li diris, ke Turkio kaj aliaj islamaj landoj jam deklaris la agnoskon de Orient-Jerusalemo kiel ĉefurbo de palestina ŝtato, tamen nun Jerusalemo estas sub la okupado de Israelo, Turkio ankoraŭ ne povas starigi sian ambasadorejon en ĝi. Li aldonis, "Se dio permesos, ni instalos nian ambasadorejon tie."

ERDOĞAN refoje persvadis Usonan Prezidenton Donald TRUMP, ke li ne prenu rimedon subtenantan la Cionisman Movadon, alie li pagos grandan koston.

La 6-an de decembro, Usona Prezidento Donald TRUMP anoncis oficialan agnoskon de Jerusalemo kiel ĉefurbo de Israelo, kaj instrukciis la Ministerion por Eksterlandaj Aferoj komenci la procezon movi la usonan ambasadorejon el Tel-Avivo al Jerusalemo. Tio estigis ĝeneralan oponon de la internacia komunumo. La organizo de Islama Kunlaboro, konsistanta el 57 membroj, deklaris la 13-an de decembro, ke ĝi aknoskas Orient-Jerusalemon kiel ĉefurbon de palestina ŝtato.

Yu
Ĉina Radio Internacia

# Rusio sukcese sendis kunhoman spacoŝipon al internacia kosmostacio

La Rusia Ŝtata Kosma Korporacio Roskosmos diris dimanĉe [17 dec 2017] en deklaro, ke Rusio sukcese lanĉis spacoŝipon *Sojuz MS-07* kun tri astronaŭtoj el la kosmodromo *Bajkonur* en Kazaĥio.



La spacoŝipo estis propulsita de la raketo *Sojuz-FG*, kiu estis lanĉita je la 10-a horo kaj 21 minutoj laŭ moskva tempo el la lanĉejo de la vojaĝo de GAGARIN, kaj planas kupliĝi kun la Internacia Kosmostacio je ĉirkaŭ la 11-a horo kaj 43 minutoj marde [19 dec 2017] laŭ moskva tempo.

La kajuto de la *Soyuz MS-07* portas rusian astronaŭton Anton SHKAPLEROV kaj lian usonan kolegon Scott TINGLE kaj la japanan kolegon Norishige KANAI.

Rusiaj spacoŝipoj nun estas la ĉefaj veturiloj por flugoj al la Internacia Kosmostacio.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

# Konkura vendo de speciala kafo – la rekordo pri prezo

Estis produktita en Patrosinjo (subŝtato Minas-Ĝerajso, Brazilo) la plej multekosta speciala kafo de la mondo. Ĝiaj 60-kilogramaj sakoj estis aĉetitaj de japanoj kaj aŭstralianoj kontraŭ po 55 457,60 realoj (ĉirkaŭ 14 300 eŭroj). Estis ofertitaj kaj venditaj ses sakoj de tiu kafo kadre de virtuala konkura vendado aranĝita de la organizaĵo "*Alliance for Coffee Excellence* – ACE".



Laŭ Brazila Asocio de Specialaj Kafoj tiu rekordo estis konigita kiam la nomoj de la bieno "*Fazenda Bom Jardim*", kaj de la terkultivisto "Gabriel Alves NUNES" el Patrosinjo aperis la 13-an de novembro 2017 je identigo de la ĉampiono en la kategorio "*Pulped Naturals*" de la konkurso "*Cup of Excellence*", okazinta pasintoktobre en la urbo "*Venda Nova do Imigrante*", subŝtato Espirito-Santo, Brazilo.


La ĉampiona produktisto NUNES (28-jaraĝa), surpriziĝis je tiom bona trafita prezo je BRL 55 mil, ĉar li estis atendanta ĝis BRL 25 mil, konsiderante la rekordan prezon je BRL 18 mil de tiu sama virtuala konkura vendo en 2016. "Ni estas familia entrepreno kaj nun ni spertas multan feliĉon, ĉar ni konsistas el sindediĉa teamo", li diris.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog

# Filozofio: Memhelpaj filozofiaj skoloj en la antikveco

**Epikurismo**

Epikurismo estas fondita de EPIKURO [greke, Ἐπίκουρος; latine, Epicurus ] (ĉ.341 – ĉ. 270 a.K), greka filozofo de la helena periodo. Li sin prezentis kiel kuracisto de animoj kaj restis konata kiel la filozofo de la ĝardeno, ĉar li kunigis siajn disĉiplojn por studi kaj primediti la vivon en la ĝardeno de sia domo, en Ateno.



EPIKURO konstruis sian filozofion surbaze de la doloro. Li multe suferis pro kronikaj malsanoj kaj sin dediĉis al efektiva aplikado de siaj teorioj, instruante manierojn venki la doloron kaj bone profiti la plezurigajn momentojn de la vivo. Li diris, ke la filozofio ekzistas ne nur por klarigi la aferojn, sed ankaŭ por helpi la homojn vivi pli bone.

La kerno de la filozofio de EPIKURO estas la kontrasto kaj senĉesa alternado inter doloroj kaj plezuroj. Ne ekzistas senlima plezuro, tamen aliflanke neniu doloro estas eterna. Ne ĉiuj plezuroj estas bonaj kaj ne ĉiuj doloroj estas malbonaj.

Kvankam la plezuro, kiel principo de la bono, estas necesa por la feliĉo, oni ne devas elekti iun ajn plezuron. Estas evitendaj tiuj, kiuj povas estigi dolorojn, kiel troa drinkado kaj senfina akumulado de riĉaĵoj. La bonaj plezuroj estas tiuj, kiuj serenigas la animon, devenantaj de kontakto kun la naturo kaj regado de la propraj sensaĵoj kaj emocioj. Krome, laŭ la epikurisma doktrino, la foresto mem de doloro devas esti rigardata kiel plezuro. Estas plezuro kiam iu doloro estingiĝas kaj tial oni ne devas malami la doloron.

Ne estas eble eviti ĉiujn dolorojn, sed estas eble eviti ĝuste la plej malbonajn, originantajn el frustracioj, el deziroj ne plenumitaj. Kaj eblas ankaŭ malpliigi la nevitendajn dolorojn per rememorado de bonaj momentoj jam travivitaj.

Pro tio, ke la serĉado de la plezuro estas fundamento de epikurismo, multaj asocias ĝin kun hedonismo, tamen inter ili estas klara diferenco. La hedonismo instigas siajn adeptojn al tujaj kaj kiel eble plej intensaj plezuroj, eĉ seksaj, dum epikurismo konsilas malproksimiĝi de pasioj kaj malmoderaj plezuroj, kiuj

fine okazigas suferojn. Unu el la aforismoj de Epikuro estis: “Neniu plezuro estas per si mem malbona, sed tio, kion kelkaj plezuroj naskas, okazigas suferojn multe pli grandajn ol la plezuroj mem.”

La koncepto de epikurismo pri la vivodaŭro estis simila al tiu de stoikismo. La vivo estas mallongdaŭra, oni ne malŝparu ĝin kun senutilaj ĉagrenoj. Ambaŭ skoloj instruis ankaŭ, ke ne estas motivo por timi la morton. La diferenco, pri tiu punkto, estas en la premisoj: laŭ stoikismo, la morto estas nia neevitebla destino, antaŭdifinita de ia supera forto; laŭ epikurismo, la morto estas simple disiĝo de atomoj, ĉesigo de la konscio.




La latina devizo *carpe diem* [kaptu [la] tagon - "ne perdu vian tempon"] iel resumas la rekomendojn de Epikuro al liaj disĉiploj. Por la saĝa homo la nuna momento estas la plej grava en lia vivo, li rigardas ĝin kvazaŭ lastan kaj unikan kaj eltiras maksimuman profiton el ĝi. Li ne difektas sian pasantan tagon sopirante pri io, kion li ne havas.

Alia interesa opinio de Epikuro estas pri libereco kaj sendependeco. Laŭ li, ĉiu homo devas lerni kiel sufiĉi al si mem kaj ne dependi de iu aŭ io alia por senti sin bonfarta. La vivo de tiuj, kiuj deziras havi ĉiam pli, estas plena de afliktiĝoj kaj suferoj. La forto venas ne de posedaĵoj, sed de memregado.


La plezuro plej alte taksata inter la epikuristoj estis la amikeco. Pro tio, kiel dirite, la disĉiploj de Epikuro kuniĝis komunume en lia ĝardeno por pripensi, ĝui la naturon kaj fajnigi siajn sensojn. Ili kredis, ke por esti feliĉa la homo bezonas tri aferojn: liberecon, amikecon kaj tempon por filozofi.

Malsame al la stoikistoj kaj al Platono, Epikuro ne kredis je Dio aŭ dioj. Malgraŭ tio, li rigardis la bonon kiel gravan regulon por la homa konduto, dirante, ke ĉiuj ni, dum nia vivo, devas elekti iun, kies virtojn ni admiras, por imiti kaj vivi kvazaŭ tiu persono nin observas la tutan tempon.

José Mauro Progiante
La Lampiro, n-ro 148

# Historia rezolucio

La 24-an de marto 2017, la Sekureca Konsilio de UN unuanime akceptis Rezolucion 2347 pri protektado de kultura heredaĵo, epokfara venko! Necesis preskaŭ unu jarcento kaj duono por ke la ideo maturiĝu. Dum la kelkaj pasintaj jaroj, ĉio subite ekprogresis. Naskiĝis nova konsciiĝo pri la rolo kiun kultura heredaĵo povas ludi por stimuli sekurecon.



La nombro de armaj konfliktoj intensiĝis ekde la 1980-aj jaroj, unue en Centra Azio (Afganio) kaj poste, parte, en la regionoj de Proksima Oriento (Irako kaj Sirio) kaj de Okcidenta Afriko (Malio), kio kuntrenis la oftiĝintan detruon de historiaĵoj fare de terorismaj grupoj kaj la subitan kreskadegon de ŝakrado de artefaktoj. Fronte al la detrua frenezeco de la organizo "Islama Ŝtato" (IŜ), la internacia komunumo reagas kun nova energio kaj pliampleksigas la gamon de la iloj ebligantaj protekti kiel eble plej bone la kulturan memoron de la homaro. En 2017, ĝi unuanime esprimis sian politikan volon por protekti la mondan kulturan heredaĵon. Rezolucio 2347 de la Sekureca Konsilio de UN formale rekonas ke la defendo de la kultura heredaĵo estas imperativa por sekureco.

Longan tempon bezonis embria ideo pri la imuneco de la kulturaĵoj dum milito, por fariĝi historia decido, kiu atestas novan konsciiĝon pri la rolo de kulturo por la sekureco.

Tiu historio komenciĝis fine de la 19-a jarcento, kiam dek kvin eŭropaj ŝtatoj kunvenis en Bruselo (Belgio) la 27-an de julio 1874, por ekzameni la projekton de internacia interkonsento pri la leĝoj kaj moroj de la milito. La Deklaracio kiu rezultis, post unu monato, indikis, en sia Artikolo 8, ke dum milito la farinto de "ĉia kapto, intenca detruo aŭ difektado (...) de historiaj monumentoj, artaĵoj aŭ sciencaĵoj, devas esti persekutata de la kompetentaj aŭtoritatoj".

Post dudek kvin jaroj, iniciatite de la Rusia caro Nikolao la II-a, Internacia Konferenco pri Paco estis okazigita en Nederlando, en 1899, por revizii la (neniam ratifotan) Deklaracion de 1874, kaj akcepti Konvencion Respekte pri la Leĝoj kaj moroj de Surtera Milito.

Konata ankaŭ kiel La Haga Konvencio, tiu ĉi teksto konsiderinde evoluigis la internacian juron kaj starigis la principon de imuneco de la kulturaĵoj. "Okaze de sieĝo kaj bombado, ĉiaj necesaj klopodoj devas esti farataj por laŭeble ŝpari la konstruaĵojn dediĉitajn al religiaj kultoj, artoj, sciencoj aŭ karitataj celoj, historiaj monumentoj, hospitaloj [...] se tiuj ne estas samtempe uzataj por militaj celoj. La devo de la sieĝatoj estas indiki tiujn konstruaĵojn aŭ kunvenejojn per specialaj videblaj signoj, kiuj estos antaŭsciigitaj al la sieĝontaro", precizigas Artikolo 27 de la Regularo (reviziita la 18-an de oktobro de 1907). Post tri jardekoj, en 1935, la Antaŭparolo de la Roerich-Pakto, tutamerika iniciato por protekti artajn kaj sciencajn instituciojn kaj historiajn monumentojn, formulis la ideon ke la kulturaĵoj "konstituas la heredaĵon de la kulturo de la popoloj", kaj tial devas esti protektataj "dum milito kaj paco ".

### Konvencioj kaj dekretoj epokfarantaj

Decida paŝo pri tiu temo okazis post la dua mondmilito. En 1948, Nederlando submetis al

Unesko novan projekton de internacia teksto pri la protekto de artaĵoj en kazo de arma konflikto. La Organizo komencis proceduron de verkado de nova internacia konvencio akceptota en Hago (Nederlando) en 1954.

Sekurigo kaj respekto estas la devizaj vortoj de la Haga Konvencio por protekti artaĵojn kaze de arma konflikto kaj de ĉi ties Protokolo el 1954. "La atencoj kontraŭ artaĵoj de kiu ajn popolo" estas internacie rigardataj kiel "atencoj kontraŭ la kultura heredaĵo de la tuta homaro". La teksto ankaŭ antaŭvidas sekurigi "la imunecon de la kulturaĵoj sub speciala protekto", koncernanta "malmultajn rifuĝejojn por ŝirmi moveblajn artaĵojn kaze de armaj konfliktoj, kaj monumentarojn kaj aliajn plej gravajn kulturajn nemoveblaĵojn".



En tiu sama jaro 1954, Egiptio decidis konstrui la Asuanan Baraĵon, kiu estis inundonta la Nilan valon almonte de Asuano, kaj grandan nombron da 3 000-jaraj monumentoj de tio kio iam estis Nubio. Petite de Egiptio kaj Sudano, por savi tiujn monumentojn, unu el la plej impresaj en la historio de la homaro, Unesko komencis internacian kampanjon, kiu daŭris du jardekojn, inter 1960 kaj 1980. La Kampanjo por Nubio estis ĉe la origino de la Konvencio pri la Protekto de la Monda Kultura kaj Natura Heredaĵo, konata kiel Konvencio de 1972, stariganta la Liston de la monda heredaĵo de la homaro. La teksto antaŭvidas la registradon, en la Listo de la endanĝerigita monda heredaĵo, de la aĵoj minacataj de gravaj danĝeroj, inter kiuj troviĝas la armaj konfliktoj ĵus eksplodintaj aŭ minacantaj tuj eksplodi.

Esence danke al tiuj tekstoj, interalie, kaj al kunlaboro kun Unesko, la Internacia Punktribunalo por Eksa Jugoslavio povis kondamni al sepjara mallibereco la eksan komandanton de la Jugoslavia mararmeo Miodrag Jokić, en 2004. Temis pri la unua kondamno pro intenca detruo de kultura heredaĵo. Sub lia komando, centoj da obusoj estis pafataj inter la komenco de oktobro kaj la fino de decembro 1991 al la malnova urbo *Dubrovnik*, samjare registrita kiel Endanĝerigata monda heredaĵo.

Ĉefe sekve de tiuj konfliktoj, Unesko kaj pluraj Ŝtatoj, la partoprenantaj partioj de la Konvencio el 1954, reekzamenis ĝin kaj ellaboris la Duan Protokolon, akceptotan en 1999. Tio enkondukis novan sistemon de plifortigita protekto por la plej gravaj kulturaĵoj, kiuj ankaŭ devas esti protektataj de adekvata nacia leĝaro, kapabla taŭge puni la gravajn rompojn de la Konvencio. Kiel gravajn rompojn oni rigardas interalie ŝtelojn, rabojn, atakojn aŭ vandalismajn agojn kontraŭ kulturaĵoj, aparte tiuj metitaj sub plifortigita protekto.

Pli lastatempe, en 2016, la Internacia Puna Kortumo (IPK) deklaris kulpa pri militkrimo kaj kondamnis al naŭjara mallibereco Ahmad Al Faqi Al Mahdi, malian ĝihadiston, pro la detruo, en 2012, de dek kultaj lokoj en la urbo Timbukto, tiam falinta en la manojn de *Ansar (ad-) Din*, grupo ligita al *Al-Qaida* [Al- Kaida]. Historia juĝo: neniam antaŭe detruo de kultura heredaĵo estis rigardata kiel militkrimo).

"Tuj post la detruoj, Unesko submetis la kazon al la IPK, por ke tiuj krimoj ne restu nepunataj", klarigas Irina Bokova, Ĝenerala Direktorino de Unesko. La Organizo entreprenis serion da agadoj, ekde disponigo de topografiaj informoj al la armitaj fortoj, ĝis rekonstruo de la maŭzoleoj. Unuafoje en la historio, la sekurigo

de la kultura heredaĵo de iu lando estis enskribita en la mandato de la Misio de Unuiĝintaj Nacioj (Rezolucio 2100). Al la MINUSMA [Multdimensia Misio integrita en UN por la stabiligo en Malio] estas taskite "protekti la kulturajn kaj historiajn lokojn de la lando kontraŭ ĉiaj atakoj, kunlabore kun Unesko".

**2015, turnopunkto**

La jaro 2015 signis veran turnopunkton en la sinteno de la internacia komunumo rilate al kultura heredaĵo. Kuraĝigate de Unesko, kvindeko da landoj akceptis en februaro Rezolucion 2199 de la Sekureca Konsilio (vidu p. 12), malpermesantan komercadon de kulturaĵoj devenantaj el Irako kaj Sirio. "Tiu rezolucio rekonas ke la kultura heredaĵo troviĝas ĉe la unua linio de la hodiaŭaj konfliktoj, kaj ludas unuarangan rolon por restaŭri la sekurecon kaj konstrui politikan respondon al la krizo", dirs tiam Irina BOKOVA.

Post unu monato, konvinkiĝinta pri la efikeco de la *soft power* [milda povo, subkomprenite: de konvinkado], el Bagdado (Irako) ŝi lanĉis en la sociaj retoj kampanjon, *Unite4Heritage* [Unuiĝu por heredaĵo], celantan kunigi la mondan junularon ĉirkaŭ la valoroj de kultura heredaĵo kaj de ĉi ties protektado.

La 1-an de septembro 2015, la UNa Instituto por Trejnado kaj Esplorado (UNITAR) publikigis satelitajn fotaĵojn montrantajn ke la templo de *Bel* en Palmiro estas ĝistere detruita de la ĝihadistoj de IŜ. La ĉefa konstruaĵo de tiu loko apartenanta al la monda heredaĵo en Sirio ne plu ekzistas! Baldaŭ post tio, Italio formulis antaŭ la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj la ideon krei trupunuojn de "Blukaskuloj por kulturo". La lando subskribis, en februaro 2016, interkonsenton kun Unesko permesantan krei unuan specialan trupunuon taskitan protekti la kulturan heredaĵon en urĝaj situacioj. Ĝi konsistas el italaj civilaj spertuloj kaj "karabenistoj" [itala nomo de la ĝendarmoj] specialiĝintaj en la lukto kontraŭ la kontraŭleĝa komerco de kulturaĵoj.

Jen nun la vico de la Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj kiuj, kun Francio, organizis sub la egido de Unesko, internacian konferencon pri la protekto de la kultura heredaĵo en la konfliktaj zonoj. En decembro 2016 pli ol 40 landoj kunvenis en Abudabio por reaserti sian "komunan volon sekurigi la endanĝerigitan kulturan heredaĵon de ĉiuj popoloj kontraŭ ĝia detruo kaj ĝia kontraŭleĝa komerco", kaj rememorigi ke la sinsekvaj Konvencioj, ekde 1899, "nin devigas protekti kaj la homajn vivojn kaj la kulturaĵojn".

Laŭdire de Irina BOKOVA, jen "nova kultura pejzaĝo" kiu skiziĝas, "nova monda konscio" kiu manifestiĝas, "nova kompreno de la ligiloj inter paco kaj heredaĵo" kiu naskiĝas. Ŝiaj konvinkoj estis baldaŭ konfirmitaj per la akcepto de Rezolucio 2347 de la Sekureca Konsilio, la 24-an de marto 2017.

Tiu ĉi teksto enviciĝas kiel daŭrigo de la internacia konferenco en Abudabio, al kies du ĉefaj praktikaj atingoj ĝi revenas: la kreo de internacia fonduso kaj la organizado de reto da rifuĝejoj por la minacataj kulturaĵoj. Ĝi ankaŭ reliefigas la ligilon inter terorismo kaj organizita krimularo.

Unuafoje en la historio, rezolucio de UN pritraktas la tuton de la minacoj kiuj endanĝerigas la kulturan heredaĵon, sen geografiaj limoj kaj kiuj ajn estas la krimantoj: identigitaj terorismaj organizaĵoj registritaj sur la listoj de UN, aŭ aliaj armitaj grupoj.

Catherine FIANKAN-BOKONGA
Tradukis d-ro Christian LAVARENNE
Esperanto-Kuriero 2017, n-ro 3